

Johann Wolfgang von Goethe, Knab' rozeton vidis li	Johann Wolfgang von Goethe, Roz' sur erike- jo	Johann Wolfgang von Goethe, Heidenröslein	Johann Wolfgang von Goethe, Rozeto en herbejo
<i>tradukita de Joachim Gießner</i>	<i>tradukita de Konrad Matheus</i>		<i>tradukita de Gotthilf Sellin</i>
Knab' rozeton vidis li; erikeja floro. Juna, bela estis ĝi. Por admiru kuris li ĝoje kun adoro. Rozo, rozo, ruĝa roz', erikeja floro.	Vidiĝis eta ruĝa roz' de knab', sur erikejo. Ĝi belis en matena ros'. Hastis li al juna ŝos' admiru ĝin kun ĝojego. Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz', roz' sur erikejo.	Sah ein Knab ein Röslein stehn, Röslein auf der Heiden, War so jung und mor- genschön, Lief er schnell, es nah zu sehn, Sah's mit vielen Freuden. Röslein, Röslein, Röslein rot, Röslein auf der Heiden.	Knab' rozeton vidis li, Vidis en herbejo; Estis juna, bela ĝi, Por ĝin vidi kuris li, Vidis kun ĝojego. Roz', rozeto, ruĝa roz', Rozo en herbejo.
Diris knab': „Mi rom- pos vin, vi rozeta floro“. Diris roz': „Mi pikos vin, ke vi ne forgesos min, premas min doloro.“ Rozo, rozo, ruĝa roz', erikeja floro.	Diris knab': „Mi rom- pos vin, rozo sur erikejo.“ Diris roz': „Dorn' pi- kos vin, por ke vi ne forgesu min. Al mi ne estu sufero. Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz', roz' sur erikejo.	Knabe sprach: „Ich bre- che dich, Röslein auf der Heiden!“ Röslein sprach: „Ich ste- che dich, Dass du ewig denkst an mich, Und ich will's nicht lei- den.“ Röslein, Röslein, Röslein rot, Röslein auf der Heiden.	Diris knab': mi rom- pos vin, Rozon en herbejo, Diris roz': mi pikos vin, Ĉiam vi memoros min, Mi ne ĝin permesos. Roz', rozeto, ruĝa roz', Rozo en herbejo.
Knab' sovaĝa romp- is ĝin; erikeja floro. Rozo ja defendis sin kaj sufere pikis lin, ne utilis ploro. Rozo, rozo, ruĝa roz', erikeja floro.	Kaj knab' sovaĝa rompis ĝin, rozon sur erikejo. En defend' roz' pikis lin. Sed ve' kaj aĥ' ne hel- pis ĝin. Venis sort' sen tolero. Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz', roz' sur erikejo.	Und der wilde Knabe brach 's Röslein auf der Heiden; Röslein wehrte sich und stach, Half ihm doch kein Weh und Ach, Musst es eben leiden. Röslein, Röslein, Röslein rot, Röslein auf der Heiden.	Knab' sovaĝa romp- is ĝin, Rozon en herbejo; Kvankam roz' defen- dis sin, En koler' ĝi pikis lin, Tamen morti devis. Roz', rozeto, ruĝa roz', Rozo en herbejo.
...

*Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 - †2003-11-25).*

Arg-1022-2225 (2014-12-16 16:29:14)

Tiu ĉi kanto-traduko troviĝas en <http://arkivo.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.

*Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de Konrad Matheus.*

Arg-1022-2227 (2014-12-17 13:24:53)

S-ano Konrad Matheus loĝas en Mühlenweg 20, D-33038 Nieheim, Germanio.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22).*

Arg-1022-2069 (2014-05-23 13:04:27)

La poemo troviĝas en <http://de.wikipedia.org/wiki/Heidenröslein>.

Melodioj estas aŭdeblaj en <http://ingeb.org/Lieder/saheinkn.html>.

La plej konata Melodio estas tiu, kiun verkis Heinrich Werner. Pri tiu vidu la vikipediejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Heinrich_Werner_\(Komponist\)](http://de.wikipedia.org/wiki/Heinrich_Werner_(Komponist)).

*Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de GOTTHILF SELLIN (*1844-05-18 - †1921-10-09).*

Arg-1022-2071 (2014-12-16 16:00:17)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en http://kantaro.ikso.net/rozeto_en_herbejo. Tie oni povas aŭdi ankaŭ la melodion. Pri la tradukinto vidu la retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Gotthilf_Sellin.